

**SINJORO, MEMORU PRI MI, KIAM VI ESTOS EN VIA REGNO
– Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

El la evangelio laŭ Luko 23, 35-43

En tiu tempo, kiam oni krucumis Jesuon, la popolo staris kaj rigardis, la regantoj de la popolo mokis Jesuon kaj diris: «Li savis aliajn; nun Li savu sin mem, se Li estas vere la Meso, la elektito de Dio!». Ankaŭ la soldatoj primokis Lin; ili alproksimiĝis al Li kaj prezentis al Li vinagron, dirante: «Se vi vere estas la reĝo de la Judoj, savu Vin mem!». Super la kapo de Jesuo ili pendigis skribaĵon kun la vortoj: «Ĉi tiu estas la reĝo de la Judoj».

Kaj unu el la pendigitaj krimuloj insultis Lin dirante: «Ĉu Vi ne estas la Meso? Savu Vin mem kaj nin!». Sed la alia intervenis riproĉante lin, kaj diris: «Ĉu vi ne timas Dion, dum vi troviĝas en la sama kondamno? Ni ricevis juste punon pro niaj faroj; sed Li faris nenion malbonan».

Poste li aldonis: «Jesuo, memoru pri Mi, kiam Vi estos en via regno». Jesuo respondis al li: «Vere Mi diras al vi: hodiaŭ vi estos kun Mi en Paradizo».

Ne ekzistas neeblaj situacioj, neneripareblaj kazoj. Ankaŭ por tiuj homaj eventoj kiuj ŝajnas la plej senesperaj estas pli ol

unu espero, estas la certeco de la amo de tiu Dio kiu, kiel skribas Paŭlo en la letero al la Romanoj, enfermis ĉiujn en la malobeon por estis kompatema al ĉiuj.

De la paradizo, laŭ la Libro de la Genezo, estis forpelita la pekinta homo, la bildo de Dio do kiu punas, kiu riproĉas la pekulojn. Nu en la evangelio de Luko la unua persono kiu eniros la paradizon kun Jesuo estos ĝuste anonima kanajlo, bandito, kaj, de tiu momento, la pordoj de la paradizo, tio estas de la savo, restos malfermataj por ĉiuj tiuj kiuj rekonas Jesuon kiel reĝo, nome kiel tiu kiu ilin prizorgas, kia ajn estas ilia pasinteco, ankaŭ por la lastminutuloj.

Kial? Jesuo, kiel li mem asertis, venis serĉi kaj savi tion kio estis perdita. Kaj tion evangeliisto Luko demonstras ekde la komenco ĝis la fino de sia evangelio. Komence, kiam la paŝtistoj, kiuj estis konsiderataj pekuloj, kiuj timis la punon kaj riproĉon de Dio, estas ĉirkaŭataj ne de la kolero de Dio kiu ilin cindrigas, sed de la gloro de Dio, de la lumo de Dio, kaj aŭdas la anĝelan koruson anonci : "Pacon surtere por la homoj kiujn li amas", la amo de Dio estas por la tuta homaro. Ĝis la lastaj paĝoj de la evangelio en kiuj Jesuo certigas al bandito krucifiksita kun li, ke li estas enironta paradizen sen peti de li eĉ minimuman pentofaron, sen demandi ĉu li pentis, sen diri al li restadi iome en la purgatorio, Jesuo diras al li: "*Hodiaŭ vi estos kun mi en la paradizo*".

La primitiva eklezio sin sentis en embaraso antaŭ ĉi tiuj epizodoj de senkondiĉa amo, ĉar tio kontrastis kun ĝia rigoro. Pro tio do oni parte ĝin mildigis. Pro tio la anĝela anonco al la paŝtistoj: "Pacon surtere por la homoj kiujn li amas" senkondiĉa amo do por ĉiuj, estis transformita. "Kaj pacon surtere por la homoj de bona volo". La kategorio de la donaco eldirita de la

evangeliisto estis tuj transformita en laŭmerita kategorio, tiu merito kiun Jesuo venis por elimini.

La bona novaĵo estas tiu: Jesuo prezentas Patron kiu estas bonvolema al la sendankaj kaj fiaj, kies amo doniĝas ne por la meritoj de la homoj, sed por iliaj bezonoj, ne por iliaj virtoj, sed por iliaj necesoj, sed tio estis netolerebla por la primitiva eklezio, pro tio la esprimo "Kaj pacon surtere al la homoj kiujn li amas", estis transformita al "pacon surtere al la homoj de bona volo", tiuj kiuj ĝin meritas.

Kaj ankaŭ la fina epizodo, tio estas ke Jesuo certigis al tiu krimulo lokon en la paradizo, ne estis akceptata. Pro tio oni klopodis mildigi iome tiun bildon pro kio estis kreita la persono de la bona ŝtelisto, sed nenio en tiu ĉi epizodo parolas pri la boneco de tiu kanajlo. Li estis inventita, estis kreita nomo, Disma, sanktigita, Sankta Disma, kaj eĉ trovita tagon por lin celebri, la 25an de marto, festo de Sankta Disma, protektanto de la ŝtelistoj – espereble almenaŭ pentitaj – de la mortontoj kaj de la enterigistoj.

Sed ni vidu tiun belegan paĝon de Luko en kiu la evangeliisto ne priskribas la fiaskon de Jesuo, tiun homon alnajlitan al kruco, sed la triumfon de la amo. Jesuo havas ĉiujn kontraŭ si. Lin kontraŭstaras la popolo, lin kontraŭstaras la estroj, lin kontraŭstaras la soldatoj kaj lin kontraŭstaras eĉ unu el la malbonuloj kun li krucumitaj. Kaj tio kiu kunigas ĉiujn tiujn personecojn estas la renovigo de la tentoj de la diablo en la dezerto.

La diablo en la dezerto diris al Jesuo: "Se vi estas la Filo de Dio, utiligu viajn kapablojn je via avantaĝo". Jesuo seke malakceptis, kaj la diablo diris ke li revenos je la taŭga momento, je la favora momento. Jen ĝi. Jesuo estas malforta, krucumita, kaj ĉiuj kontraŭstaras lin. Kontraŭstaras lin la popolo, la estroj,

kiuj eĉ primokas lin, la soldatoj kiuj lin malestimas, lin kontaŭstaras eĉ unu el la krimuloj kaj ĉiuj tiuj diras "*Savu vin mem*".

Ili ne komprenis ke Jesuo ne venis por savi sin mem, sed por savi la aliajn. En ĉio tio la persono konsiderata plej malproksima de Dio, pekulo, bandito, krimulo, krucumita kun li, alparolas Jesuon – per fido sendube senpudora – "*Jesuo, memoru pri Mi, kiam Vi estos en via regno.*"

Do la persono kiu estas konsiderata la plej malproksima de Dio, ekskludita de Dio, la persono kiu devintus esti punata, riproĉata de Dio, vidas en Jesuo esperon ankaŭ por li. Sed li ne kuraĝas pli ol tio, li nur petas esti memorigata. Sed Jesuo preteriras la atendojn, la dezirojn kaj la esperojn de la homoj kaj donas multon pli. Kaj Jesuo respondas al li: "*Vere Mi diras al vi: hodiaŭ vi estos kun Mi en Paradizo.*"

Jesuo ne memoras pri tiu krimulo kiam li estos en sia regno, sed li garantias al tiu ke samtage li estos kun li en la paradizo. Estas la ununura vojo en kiu Jesuo eldiras tiun vorton "paradizo". Kiam li devas paroli pri la eterna vivo li utiligas aliajn vortojn; la ununura fojo estas por kontraŭstari la teologion eldiritan en la libro de la Genezo, en kiu Dio punas la pekintan homon kaj lin forpelas de la paradizo. Kun Jesuo okazas absolute la malon: ĝuste la pekulo eniras kun li en la paradizon.

Kial? Ĉar la teologio de Luko, la esprimo de la bona novaĵo de Jesuo: Dio ne atentis la meritojn de la personoj, sed iliajn bezonojn, ne ilian virtojn sed iliajn necesojn. Jesuo venis por serĉi kaj savi tiujn kiuj estis perditaj. Pro tio ne ekzistas kazoj neeblaj, kazoj senesperaj, sed la savo estas por ĉiuj tiuj kiuj rekonas Jesuon kiel ilian liberiganton kaj kiel ilian reĝon.